

Leterujo

Claude Gacond, 217-a radioprelego, 1967.12.06 & 1967.12.09

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Paŭzo post nia prelegaro pri nia lingvo permesas al ni malfermi nian leterujon kaj babileti momenton kun niaj geaŭdantoj. Viaj leteroj kaj poŝtkartoj, estimataj gesamideanoj, ebligas al ni ne nur desegni mapon pri la aŭdado de niaj elsendoj. Ili ankaŭ alportas viajn ŝatojn kaj dezirojn.

A.- Prezente la geaŭdantojn, kiuj skribis de post nia pasinta leterrespondo, ni samtempe tuŝos la temojn, kiuj estas ŝatataj.

Cl.- En Britio ni havas tre fidelajn geaŭskultantojn, kiuj regule skribas siajn impresojn kaj vidpunktojn. Ili estas sinjoro F. Blunden en Londono, gesinjoroj John Brownlee en Uppminster, kiuj kutime ne ŝatas poezion, sed tamen aprezis tiujn, kiuj aperis en nia kurso pri nia lingvo. La familio B. Najbaro en Keighley, kiel preskaŭ ĉiuj ceteraj aŭskultantoj, atentege aŭskultis nian raporton pri la libro *Les Patries* de Jean Diedisheim. Ilia nomo Najbaro estas esperantigo de latva antaŭnomo, kiun la okcidentanoj ne kapablis prononci. Sinjoro Najbaro ŝatus, ke foje ni diskutu pri la esperantigo de la personaj kaj geografiaj nomoj. Ni obeas kaj metas tiun temon en nian preleg-programon. Salutis ankoraŭ gesinjoroj Walter kaj Alice Peake, ĉe kiuj niaj prelegtemoj vekas interesajn diskutojn, kaj sinjorino Ida Tucker en Austwick.

A.- Sinjoro Jiri Patera en Most, Ĉeĥoslovakio, kiu studas apud sia ĉiutaga laboro, ege aprezis nian kurson pri la esperanto-movado. « *Ĝi donas ĉiam novajn pensojn, impulsojn, ekzemplojn kaj instigojn por la nuna laboro.* » Al tiu samideano ni sendas pere de nia radio kelkajn numerojn de *Sennaciulo*, kie aperis artikole nia prilingva kurso.

Cl.- Multnombraj estas niaj avidaj perradiaj kursanoj. Fraŭlino Olga Thander en Pietarsaari, Finnlando, kaptas meznokte niajn ondojn. Ŝi listigis la nomojn de la volapukistoj, kiuj, laŭ nia rakonto, fariĝis gravaj pioniroj de esperanto. Ni pensas, legante tiajn leterojn, ke speco de regulaj revizioj pri nia propra literaturo povus interesi multajn geaŭdantojn. Nia finnlanda samideanino trovas, ke la svisaj popolkantoj, kiujn nia radiostacio elsendadas, memorigas la laponajn « jiku ». La svisaj kantoj estas nur kvazaŭ pli koloraj, ol la laponaj.

A.- Por reveni al pli proksima lando ni elektu Francion. Salutis sinjorino E. Kohler en Besançon, sinjoro Maurice Merger en Saint-Julien-les-Villas, gesinjoroj Gaston Turin en Pontarlier kaj Gaston Vidal en Chamalière. Multaj el ili ŝatus ricevi indikojn ebligantaj aĉeti la libron *Les Patries*. Do, karaj geaŭdantoj, prenu skribilon kaj notu tion :

Cl.- Aŭtoro : Jean Diedisheim. Mi ripetas : Jean Diedisheim : DIEDISHEIM. Titolo: *Les Patries*. Mi ripetas: *Les Patries*. Eldonejo : Editions de la Baconnière, Neuchâtel, Svislando. Mi ripetas : Editions de la Baconnière, Neuchâtel, Svislando. BACONNIERE.

A.- Tiu eldonejo kunlaboras kun Payot, do la libro estas facile aĉetebla en ia ajn librejo.

Cl.- Eldonjaro : 1967.

A.- En Germanio sinjoro Walter Kaukal en Neustadt deziras scii, kiu faris la tradukon de la cititaj eroj. Ni mem faris tiun laboron. Kaj ni nun redaktas artikolojn por esperanta revuo. Kiam ili aperos, ni vin avertos. Li deziras informojn pri la pritrakto de esperanto far la Internacia Olimpika Komitato, kies sidejo troviĝas en Lausanne, Svislando. Ni notas tiun temon por prelego.

Leterujo

Claude Gacond, 217-a radioprelego, 1967.12.06 & 1967.12.09

Cl.- El Germanio skribis ankoraŭ sinjoro Bruno Gahler en Glinde, doktoro J. Kondor en Lampertheim, Gerhard Kunze en Wittlensweiler, sinjoro Ernst Muthschall en Halle, sinjoro Bruno Siegert en Fürth, kiu kuŝas en maljunulejo. Sed li ĝojas relegi nian kurson pri la esperanta vivo en *Sennaciulo*.

A.- Alia maljuna samideano skribis. Li nomiĝas Pal Balkanyi kaj loĝas en Budapeŝto, Hungario. De sinjoro Kalocsay li ricevis la aprilan numeron de *Sennaciulo*, kie aperis nia unua prilingva artikolo. Kun plezuro ni sendos al li la numerojn de majo, junio, julio, aŭgusto kaj novembro, kie aperis aliaj artikoloj. El Hungario salutis ankoraŭ sinjoro Tibor Tolnai en Karinthy kaj sinjorino Elizabeta Regöci-Scabo en Budapeŝto.

Cl.- Multaj geaŭdantoj interesiĝis pri la letero de nia usona samideano. Sinjoro Richard E. Wood en Bloomington, Indiana, Usono, plian fojon kaptis niajn ondojn. Jen citaĵo el lia letero : « *Mi ege dankas vin pro la tre bela kaj iom flata elsendo, kiun mi bone kaptis la 15-an de julio. Mi sonbendigis kaj vaste ludigis ĝin. Nia kurso bone progresas. Tre baldaŭ sinjoro Charters kaj mi vizitos la progresemaĵn lernejojn en Kalifornio, kie oni instruas esperanton, kaj sinjoro Charters instruos rapidan seminarion. Kiam lia kurso estos preta, li sendos al vi ekzempleron por viaj komentoj, ĉar temas pri eksperimenta kurso, kaj ni volus havi eŭropan opinion.* »

A.- Ni do atendas, kaj raportos pri niaj impresoj pere de nia svisa radio. Ni ankoraŭ ricevis salutojn de sinjoro Giovanni Bissaldi en Bolzano, Italio, sinjorino H. Zwaanswijk-Dik en Alkmaar, Nederlando, sinjoroj Franco Denkowski kaj A. Odov, ambaŭ en Katowice, Pollando. Kaj ni finas kun Svislando, el kie venis salutoj de Sinjorino Grin-Mottaz kaj fraŭlino Hélène Chavan en Lausanne kaj sinjoro Henri Perriard en Chabrey. En Svislando niaj esperantaj programoj estas ripetataj pere de la telefona dissendado, kanalo Monte Ĉeneri.

Cl.- Multaj geaŭdantoj diris sian plezuron pri tiu babilado kun la esperantistaro. Ili havas la impreson malkovri forajn amikojn, kaj dezirus scii, kiom da geaŭdantoj sendas regule vivsignojn al Radio-Svislando.

A.- Ni volonte respondas al tiu deziro kun du celoj : Unue kuraĝigi la esperantistaron de tempo al tempo perletere rilati kun siaj radio-elsendejoj kaj due doni al vi ideon pri la eteco de la esperantistaro.

Cl.- En Aŭstrio ni havas 2 skribemajn aŭskultantojn, en Britio 14, en Ĉeĥoslovakio 1, en Finnlando 1, en Francio 14, en Germanio 21, en Hungario 5, en Italio 3, en Jugoslavio 4, en Nederlando 5, en Pollando 3, en Svedio 3, en Svislando 10, en Usono 1, en Turkio 1. Entute do 86 geaŭdantoj donis al ni vivsignon pri sia ekzisto.

A.- Kiel vi konstatas, el kelkaj landoj neniam alvenis vivsignoj. Se vi apartenas al unu el ili ne hezitu skribi al ni.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-